

Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ (1955 – 2018)

La 5-an de majo 2018 forpasis Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ, estrarano de ILEI-HU, iama estrarano de ILEI.

Enikő estas instruistino pri Esperanto kaj la germana lingvo. Ŝi ekkonis la lingvon en la jaro 1979. Ŝi partoprenis tiam en diversaj kursoj en Hungario kaj en eksterlando, parte laŭ la Ĉe-metodo. Tiam ŝi laboris en infanĝardenoj kaj konatigis la 3-6-jaraĝajn infanojn kun Esperanto kaj kun la germana lingvo, parte por eltrovi kiel tio eblas.



En 1980 Enikő trapasis superan ekzamenon pri Esperanto kaj poste komencis siajn studojn en la fakoj Interlingvistiko kaj Esperantologio en la universitato de Budapeŝto, kie ŝi diplomiĝis en 1989.

En la jaro 2003 la dekanino de la Universitato de Debrecen invitis ŝin por ekzameni pri Esperanto. Enikő finis pluperfektigan kurson por ekzamenantoj en Budapeŝto kaj ricevis permeson ekzameni en la Ŝtata Fremdlingva Ekzamena komisiono (ITK). Ekde tiam ŝi havis rajton ekzameni kaj en la unulingva kaj en la dulingva ekzamenoj. Ŝi instruis Esperanton en du lingvolernejoj de la urbo Nyíregyháza, en la Pedagogia Altlernejo „Comenio” en urbo Sárospatak, en la Universitato de urbo Nyíregyháza kaj ankaŭ eksterlande.

Ekde la jaro 2008 Enikő estis membro de la estraro de la Hungaria Esperanto-Asocio, kie ŝi estis i.a. la respondeculo pri instruado. Ŝi estis membro de ILEI-HU ekde 2004, estrarano de ILEI-HU ekde 2008, kaj inter 2012 kaj 2015 ankaŭ estrarano de ILEI. Kiel estraranino de ILEI-HU, ŝi multe helpis en la organizado de la Pedagogiaj Tagoj por instruistoj pri Esperanto.

En la jaro 2014, laŭ la peto de la dekanino en la Komunikada Centro de la faklingvoj kaj fremdlingvoj en la Altlernejo de Nyíregyháza, ŝi ellaboris projekton por la instruado de Esperanto laŭ la KER-ekzamensistemo, en niveloj B1-B2-C1. Laŭ tiu programo oni instruis Esperanton en la Altlernejo ekde la jaro 2015. Ŝi partoprenis en pluraj UKoj kaj ILEI-Konferencoj kaj helpis la organizadon de diversaj eventoj, ekzemple tiun de IJL (Internacia Junulara Lingvotendaro), en la jaro 2013 ŝi mem organizis la tendaron en la urbo Nyíregyháza.

En la jaro 2016 ILEI-HU ricevis la rajton organizi la 49-an Konferencon de ILEI en Nyíregyháza. La sukcesa kandidatiĝo kaj la organizado ŝuldiĝas ĉefe al la iniciatemo kaj energia laboro de Enikő. Ŝi estis la gvidanto de la LKK, kaj dum tiuj du jaroj de la organiza periodo ŝi estis ankaŭ la sekciestro de ILEI-HU. Ŝi informis min pri sia malsano fine de 2016, sed ni esperis, ke ŝi venkos ĝin. Ŝi neniam plendis. La lastan fojon ŝi kontaktis min unu semajnon antaŭ la morto, dezirante al mi feliĉan naskiĝtagon. Eĉ tiam Enikő ne plendis, kvankam ŝi havis grandajn dolorojn. Nun ne plu. Oni adiaŭis ŝin la 17-an de majo 2018 en la urbo Balsa.

Kara Enikő, ripozu en paco!

Jozefo NÉMETH